



*Knabino,
kiu superruzis
la reĝon*

k

Por ĉi tiu fabelo estas uzata la tiparo Nyfors, desegnita de Franko Luin. La kajero estas unu en serio da kajeroj uzantaj la tiparojn de la sama desegnisto. Ili estas elŝuteblaj ĉe www.omnibus.se/fabelaro.

© 2002 Omnibus Typografi

OMNIBUS TYPOGRAFI

BOX 135 · SE-135 23 TYRESÖ, SVEDIO · TEL. 08 - 742 83 36
franko@omnibus.se · www.omnibus.se

En kaverno loĝis mizerulo, kiu havis neniun en la mondo, nur filinon. Ŝi estis tre saĝa kaj almozis ĉie kaj instruis al la patro, kiel li almozu kaj parolu saĝe.

Iam la mizerulo venas al la reĝo kaj petas lin, ke li ion donacu. La reĝo demandas lin, kiu li estas kaj kiu instruis lin tiel saĝe paroli. Li rakontas, de kie li estas kaj ke la filino instruis lin.

"Kaj via filino, kie ŝi lernis?" demandas la reĝo kaj la mizerulo respondas:

"Ŝin saĝigis Dio kaj nia priplorinda mizero."

Tiam la reĝo donacas al li tridek ovojn kaj diras:

"Portu ilin al via filino kaj diru, ke ŝi el ĉi tiuj ovoj elkovu kokidojn. Se ŝi ne elkovos ilin, mi ordonos skurĝi vin."

La mizerulo foriras kaj alvenas plore en la kaverton kaj rakontas ĉion al sia filino. Ŝi tuj rimarkas, ke la ovoj estas boligitaj kaj diras al la patro, ke li iru ripozi, ke ŝi prizorgos ĉion. La patro obeas ŝin kaj iras dormi, dum ŝi prenas kaserolon, plenigas ĝin per akvo kaj faboj kaj metas sur fajron. Matene, kiam la faboj estas kuiritaj, ŝi vokas la patron kaj diras, ke li prenu plugilon kaj bovojn kaj iru plugi apud la vojo, kie preteriras la reĝo, kaj ankaŭ la jenon:

"Kiam vi ekvidos la reĝon, prenu la fabojn, semu ilin kaj krii: 'Ho bovoj, Dio donu, ke kresku kuiritaj faboj!'"

Kiam la reĝo demandos vin, kiel la faboj povu kreski kuiritaj, respondu: 'Tute same, kiel povas elkoviĝi kokidoj el boligigitaj ovoĵ.'"

La mizerulo aŭskultas la filinon, iras kaj komencas plugi. Kiam li vidas, ke proksimiĝas la reĝo, li komencas krii:

"Ho bovoj, Dio donu, ke kresku kuiritaj faboj!"

Kiam la reĝo aŭdas tiujn vortojn, li haltas kaj diras al la mizerulo:

"La diablo prenu vin, kiel povu kreski kuiritaj faboj!"

Sed li respondas:

"Via moŝto, tute same, kiel povas elkoviĝi kokidoj el boligigitaj ovoĵ."

La reĝo tuj komprenas, ke verŝajne la filino instrukiis lin, kaj li ordonas al siaj servistoj, ke ili prenu lin kaj konduku antaŭ lin. Poste li donas al li volvaĵon da lino kaj diras:

"Prenu ĉi tiun volvaĵon. El ĝi vi devas fari ŝnurojn kaj velojn kaj ĉion, kio estas bezonata por ŝipo; se ne – vi perdos la kapon."

Terurita la mizerulo prenas la volvaĵon kaj iras plore hejmen, kie li rakontas ĉion al la filino. La filino sendas lin dormi kaj promesas, ke ŝi aranĝos ĉion. La postan matenon ŝi prenas pecon da ligno, vekas la patron kaj diras:

"Prenu ĉi tiun ŝtipon kaj portu ĝin al la reĝo, por ke li faru ŝpinilon, ŝpinradon, teksilon kaj ĉion, kio estas bezonata, por ke mi plenumu lian ordonon."

La mizerulo aŭskultas la filinon kaj diras al la reĝo, kiel ŝi instruis al li.

Kiam la reĝo aŭdas tion, li tre surpriziĝas kaj komencas pensi, kion li faru. Poste li prenas glaseton kaj diras al li:

"Prenu ĉi tiun glaseton kaj portu al via filino, por ke ŝi malplenigu per ĝi la maron, tiel ke ĝi fariĝos kampo."

La mizerulo prenas la glaseton kaj portas ĝin plore al sia filino, al kiu li rakontas ĉion, kion diris al li la reĝo. La knabino diras al li, ke li atendu ĝis la posta tago, ke ŝi ĉion aranĝos. La postan tagon ŝi vokas la patron, donas al li manplenon da ŝpinfibroj kaj diras:

"Portu ĉi tion al la reĝo kaj diru al li, ke li per ĝi ŝtopu ĉiujn riverelfluojn kaj ĉiujn lagojn; poste mi malplenigos la maron."

La mizerulo foriras kaj diras tion al la reĝo. Kiam la reĝo rimarkas, ke la knabino estas pli saĝa ol li, li ordonas al la mizerulo, ke li venigu ŝin antaŭ lin. Kiam li tion faris kaj ambaŭ kliniĝas antaŭ la reĝo, tiu demandas ŝin:

"Divenu, knabino, kion oni aŭdas je plej longa distanco?"

La knabino respondas:

"Via moŝto je plej longa distanco estas aŭdeblaj tondro kaj mensogo."

Tiam la reĝo prenas sian barbon, turnas sin al siaj kortumanoj kaj demandas ilin:

"Divenu, kiom valoras mia barbo?"

Kiam kelkaj ekdivenas ke tiom, aliaj ke tiom pli, la knabino respondas, ke neniu el ili ĝuste divenis kaj diras:

"La barbo de la reĝo valoras tion, kiom tri someraj pluvetoj."

La reĝo ekmiras kaj diras:

"La knabino plej bone divenis."

Poste li demandas ŝin, ĉu ŝi volas fariĝi lia edzino, ĉar io alia ne eblas.

La knabino kliniĝas kaj diras:

"Via moŝto, okazu laŭ via volo. Mi petas nur tion, ke vi propramane skribu leteron, ke mi rajtas el via palaco preni tion, kio estas plej kara al mi, se vi iam koleriĝos kaj forpelos min de vi."

La reĝo akceptas tion kaj subskribas. Post iom da tempo li koleriĝas al ŝi kaj diras:

"Mi ne plu volas havi vin kiel edzino. Foriru el mia palaco, kien ajn vi volas!"

La reĝino respondas al li:

"Plej alta moŝto, mi obeos vin, permesu nur, ke ankoraŭ ĉi nokte mi restu ĉi tie, matene mi foriros."

La reĝo permesas, ke ŝi tranoktu. Ĉe la vespermanĝo ŝi miksas en la vinon brandon kaj kelkajn odorantajn herbojn, invitas lin trinki kaj diras:

"Trinku, reĝo, kaj estu bonhumora, ĉar morgaŭ ni disiĝos kaj kreu al mi, ke mi estos pli ĝoja ol mi estis tiam, kiam mi renkontiĝis kun vi."

La reĝo ebriiĝas kaj ekdormas, dum la reĝino preparas kaleŝon kaj veturigas la reĝon en la kavernon. Kiam la reĝo vekigis en ĝi kaj vidas, kie li estas, li ekkrias:

"Kiu venigis min ĉi tien?"

La reĝino respondas:

"Mi faris tion."

La reĝo demandas ŝin:

"Kial vi faris tion al mi? Ĉu mi ne diris al vi, ke vi ne plu estas mia edzino?"

Tiam ŝi montras al li la leteron kaj diras:

"Estas vere, via moŝto, ke vi tion diris, sed rigardu, kion vi subskribis en ĉi tiu letero: tion, kio estas al mi plej kara en via domo, mi rajtas kunporti, kiam mi foriras de vi."

La reĝo komprenas tion, kisas ŝin kaj ili ambaŭ reiras en la reĝan palacon.

Serba popolfabelo
Tradukis Magda Melnik

